

Helpo de la eŭropanoj al la afrikanoj

Claude Gacond, 80-a radioprelego, 1964.06.10 & 13

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la helpo de la eŭropanoj al la afrikanoj. Vi aŭdas Claude Gacond.

René Dumont verkis en la franca lingvo librojn, kiuj nin permesas pli bone kompreni la situacion de la afrikaj landoj. Li estas agronomo tre konata en la internaciaj medioj. Multaj landoj petis lian helpon kaj li ĉiam kuraĝe diras sian opinion, eĉ se foje ĝi ne kongruas kun tiu de la invitinto.

Legante la libron ***L'Afrique noire est mal partie*** (*Nigra Afriko malbone startis*) mi trovis kelkajn ĉapitrojn, kiuj devus esti konataj de la esperantistaro, tiom ili bone priskribas la nunajn bezonojn kaj malfacilaĵojn de la afrikaj landoj.

Mi tradukos por vi kelkajn partojn el ili. Mi komencas hodiaŭ per unu teksto, kiu titoliĝas ***Internacia solidareco***.

René Dumont diras, parolante pri sia lando Francio^o: « *Ni fine retrovis honoron por Francio, kiam finiĝis la malnobligaj koloniaj militoj en Hindoĉinio aŭ Alĝerio. Necesus ankoraŭ uzi la fortojn tiel liberigitajn, homajn kaj monajn fortojn, pli taŭge, ol por malnobla kaj ridinda atoma forto. Milito ne plu estas konceptebla, nur monda sinmortigo restas je nia povo^o: ĝi ne urĝas. Tre larĝa frakcio el nia armeo sin malhonoris sub la flago « Honoro kaj Patrio » per siaj torturoj, mortigoj kaj detruoj; tio sendube parte, ĉar ĝi sentas sin neadaptita al la moderna mondo. Ĝiaj tradiciaj valoroj ne plu respondas al la faktoj: ekde nun la sola nobla batalo estas direktata kontraŭ malsato kaj mizero, nescio kaj malsano, por la digno de ĉiuj homoj liberigitaj el siaj multaj servutoj.*

Ni devas helpi la junulojn, trovi por ili anstataŭigan idealon, se ni volas eviti al ili faŝismemon.

Pionira spirito, sindonema ideo nepre rilatas kun tiu peza tasko. Anstataŭ lerni mortigi, de nun necesas frate helpi, do unue sin devigi kompreni...

La ĉeso de la koloniaj militoj permesas antaŭvidi la disvastiĝon de ĝeneraligita civila servo, en kiu servos volontuloj: junuloj multnombre deziras similan solvon. Unue necesas ricevi la akcepton de la junaj afrikaj ŝtatoj. Iuj nigraj studantoj rifuzas apriorie eĉ la hipotezon de simila helpo: eble ili vidas en ĝi konkurencon. Ili akceptas tiel tre pezan respondecon, tiun pligravigi la malfruiĝon de tiuj landoj, tiun pliigi la kampanan mizeron, atendante, ke afrikaj kadroj formiĝu en sufiĉaj kvantoj... Se vi nomas tion novkoloniismo, iru mem, sed kun pliigita laboremo, sen timo suprenfaldi viajn manikojn anstataŭ nur tendi vian manon. Simila servo nenion plu komunan havus ekstermare kun la armeo: ĝi devas esti absolute civitaneca. Tiuj junuloj, kiuj restus je nia servo, kun la milita soldo, dum la leĝa deĵora tempo, kostus malpli ol la spertuloj foje superpagataj rilate siajn laborojn, kaj ofte tro aĝaj por kursadi en la ĝangalo: la agrokultura batalo ne decidiĝos en la ĉefurbo...

Se ili kapablas fariĝi akceptitaj, respekti la afrikanojn – kaj la afrikaninojn, - iliajn penskutimojn kaj morojn, esti vere nekolonizemuloj, junaj eŭropanoj kun helpema spirito povus esti ege utilaj, ĉiu en sia fako, evitante iujn el la danĝeroj de la tro rapida afrikaniĝo. La junaj kampanoj estus plej ŝatataj, precipe venantaj el malriĉaj regionoj, kie oni ankoraŭ kapablas ĵugi kaj feri paron da bovoj, konduki kaj reguligi semilon kaj plugilon. Metiistoj ankaŭ estus bonvenaj: feristo reŝarpi kaj rebonigus plugilbekojn, riparus beste tiratajn maŝinojn, dum ĉarfaristo montrus kiel konstrui ĉaretojn. Ili instruus kiel fabrikaj konservi simplajn ilojn de la ĝardenisto kaj de arbohakisto, tiom necesajn nuntempe...

Laboristo, veninta kun sia ilaro, instruus ties uzon al siaj afrikaj kamaradoj. Helpataj de submajstro, ili estus precipe utilaj en ĉiuj laboresploradoj restadejoj. La multnombraj profesiaj ruzoj eŭropaj, kiujn la inĝeniero ne ĉiam konas, rapide pliigus la nunan

Helpo de la eŭropanoj al la afrikanoj

Claude Gacond, 80-a radioprelego, 1964.06.10 & 13

produktecon. Mekanikisto riparus kamionojn kaj aliajn motorojn de la kooperativoj. Ŝpara motorigo tiel povus esti akcelata.

Estonta aŭ juna kuracisto estus ŝatata, tio kompreneble ; liceano estus kapabla fariĝi instruisto, tio kun helpo de agronomo, en porkampanaj lernejoj. Tiel fruktodona kunlaboro povus esti alportata al la formiĝo de kadroj ĉiuspecaj de la kamparanaro, monitoroj, ekonomiistoj en kooperativoj kaj komunumaj oficejoj. Nature estus necese antaŭvidi akceptistrukturojn por la plej taŭga uzo de tiuj junuloj, kies rolo ĉefe estus praktika rapida profesia edukado kaj formado de kadroj. »

Sinjoro René Dumont proponas ankaŭ la formadon de instruistaro por la kreado de instruistaj kamparanaj lernejoj. Li parolas ankaŭ pri la rolo de studentoj. Kaj li aldonas :

« Ĉiu laboru are kun afrika adjunkto preta lin anstataŭi. Evidente tiuj junaj volontuloj devus esti komplete sin donantaj al la novaj afrikaj ŝtatoj, do progresemaj, en la larĝa senco de la vorto. La aliaj sendube ne estus volontuloj, ili tiam pli taŭgus por la garnizona vivo. »

Sinjoro René Dumont montras ankaŭ, ke oni devus absolute rezigni pri ĉiu ajn propagando aŭ prozelitismo. Kiel vi konstatas, Eŭropo troviĝas antaŭ bela kaj utilega tasko. Mi havas la impreson, ke kiam ni estos kapablaj tiel helpi niajn afrikajn fratojn forgesante ĉiujn ajn prozelitismen naciajn, politikan aŭ religian, ni estos mem lernintaj multon.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la helpo de la eŭropanoj al la afrikanoj.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-